



Núm. 10

OCTUBRE 1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

◆ OTRA VEZ SOBRE LO MISMO ◆

Jamás hubo entre los esperantistas la malévola intención de hacer de su idioma la clave secreta de una secta misteriosa. Con la sana alegría y el limpio optimismo de una generosidad sin límites, se esforzaron siempre, superándose siempre, en la romántica empresa de convencer a los hombres acerca de la utilidad que representa la posesión de un segundo lenguaje, común para todos, que, no siendo exclusivo de una nación favorecida, es por eso mismo tan propio para todos como el propio idioma. Este sincero propósito nuestro, tan sencillo como honrado, ha sido expuesto y propagado, desde el principio, a la clara luz del día, sin ocultar el rostro ni, mucho menos, la documentación personal de cada uno. Queremos que la gente, conociéndonos, sepa que los esperantistas somos unos hombres que sólo nos diferenciamos de los demás mortales en que hablamos y nos entendemos, a través de las barreras lingüísticas, usando, aunque sólo sea por correspondencia, cuando no personalmente, un idioma auxiliar, neutral, expresivo y fácil...

Por eso mismo, cuando alguna sombra de malicia o de ignorancia pretende hurtarle reflejos a la esmeralda de nuestras alegres esperanzas, no es posible dejar pasar la extrañeza, que hacemos patente, de que personas sensatas y cultas, en evidente inferioridad con Pero Grullo, no sepan todavía que un idioma no es otra cosa que... un idioma; es decir, un medio de mayor o menor calidad literaria, con más o menos acervo espiritual, según su tradición y su influencia en la historia, pero siempre un remedio que los hombres emplean para cambiar entre sí ideas y pensamientos. Así, pues, un idioma puede ser privativo de una región, de una nación, de un estado, aunque no siempre, pero nunca—¡jamás!—de una tendencia ni de una creencia determinada.

...Y el Esperanto, hablado por gentes de toda la gama de color de las diversas razas étnicas y de las múltiples banderas de los diversos idearios políticos, usado lo mismo en los grandes congresos mundiales que en la suave intimidad de los hogares, impreso en millares y millares de libros y en centenares de revistas y periódicos, no es nada más, ni nada menos, que un idioma:

¡el idioma auxiliar internacional por excelencia!



El padre franciscano italiano Modesto Carolfi, entusiasta paladín del Esperanto en los medios católicos de Roma, tomó parte muy activa en el reciente Congreso de Bournemouth; aquí se le vé en animada conversación con Wanda Zamenhof, hija política del autor del idioma, y con Tadros Megalli, incansable propagandista del esperantismo en los centros intelectuales de Egipto y demás países árabes



Antaŭ nelonge, esperantista gazeto menciis konaton historieton pri « La vazo de Soissons ». En Hispanio, oni konas similan temon, sed tute sub alia formo, kiu respegulas tamen la saman neklerecon pri fakto nepre koninda de mezklera persono. Ni presigas tiun rakonton kun la espero, ke oni legos plezure pri la malplezuro de lerneja inspektoro

Foje, dum sia rondiro, lerneja inspektoro vizitis montan vilaĝon. Akceptita ĉe la lernejo, li inspektis ĉion koncerne al sia ofico; kaj poste, li ekzamenis la lernantaron.

Demandinte al ĉiuj pri matematiko, gramatiko kaj sciencoj, li konvinkiĝis pri la malalta nivelo de pleja parto el la infanaro. Antaŭ ol sia foriro, li faris ankoraŭ kelkajn demandojn, tute sensukcese; fine, li demandis, indulge, al unu el la malpli fuŝaj: «Ĉu vi scias, kiu skribis «Don Kiĥoto». La demandito, timoplene, respondis: «Mi, ne, sinjoro Inspektoro!». Aŭdinte tiun stultan respondon, la inspektoro koleriĝis, kaj, nervoze, demandis: «Ĉu, hazarde, estas iu, el vi, kiu scias pri ĝi?». Responde, ĉiuj kunlernantoj kapneis kaj diris samtempe: «Ni ne faris tion, Sinjoro!». Tiu respondo frenezigis la inspektoron, kiu, sin turnante al instruisto, sputis al li tiun riproĉon: «Kiel estas eble, ke neniu el ili scias, kiu skribis «Don Kiĥoto?»: La instruisto, humile respondis: «Bonvolu ne koleriĝi, Sinjoro, ili estas bonaj knaboj, kaj kiam ili asertas al vi ke ili ne skribis ĝin, tio estas la vero!» Tute hirtigita pro kolero, la inspekoro foriris subite, renversante benkojn kaj seĝojn. Surstrate, li renkontis la vilaĝestron, kiu demandis al li: «Kien vi iras tiel ekscitita?». La inspektoro respondis: «Mi iras rekte al la stacidomo. Mi ne plu volas vidi vilaĝon, kie neniu en la lernejo, de la instruisto ĝis la lasta lernanto, scias, kiu skribis «Don Kiĥoto». Post mallonga pripenso, la vilaĝestro konsilis al inspektoro: «Ne ĉagreniĝu; la instruisto estas sincera homo, kaj, se li diras tion, estas vero; li ne scias, kiu skribis tion». La inspektoro saltegis kaj rapidis al la stacidomo, cerbumante la punon, kiun li aplikos al la neklera instruistaĉo...

Li alvenis, kaj, akirinte la bileton, li promenis sur la kajo, treege ekscitita, kaj ripetante al si mem: «Ho, ne scii, kiu skribis «Don Kiĥoto!... La staciestro, vidante sur la kajo homon tiel ekscitita, sin turnis al li kaj demandis: «Sinjoro, mi vidas al vi treege nervoza. Kio okazas al vi?». La inspektoro, vidante antaŭ si homon kun klera aspekto, rakontis al li sian koleron pro la malklero de ĉiuj tieaj enloĝantoj pri tiu, kiu skribis «Don Kiĥoto». La staciestro, sen multa pripenso en la respondo diris tuj al li: «Se mi estus vi, mi ne forirus sen trovi la homon, kiu skribis tiun aferon!».

De tiam, la malfeliĉa inspektoro forviŝis la nomon de la vilaĝeto en sia kajero kaj, nature, ne plu revenis en tiun regionon.

CIRANO

REZOLUCIO

KONTRAŬ LA "ESPERANTO SIMPLIGITA" DE PASTRO J. KUBACKI

La jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo en Trondhejmo, pentekoste de 1949.

KONSTATAS, ke la proponoj de pastro J. Kubacki (South Bend, Indiana, Usono) pri ŝanĝoj en la ortografio kaj vortaro de Esperanto, kontraŭas al la Fundamento.

KONSTATAS, ke la agado de pastro J. Kubacki povas nur disigi la fortojn de la Esperanto—Movado, anstataŭ kunigi ilin, kaj

REKOMENDAS al la tutmonda esperantistaro malaprobi la proponojn de pastro J. Kubacki kaj ĉiumaniere kontraŭlabori lian agadon, por la bono de nia afero, kaj

ADMONAS pastron J. Kubacki tuj ĉesigi sian subfosan agadon, en la intereso de la internacilingva movado.

Ĉiuj Esperanto-gazetoj estas petataj represi ĉi tiun rezolucion.

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

POR KIO TAŬGAS ESPERANTO?

Inter tiuj, kiuj tiel esprimiĝas, estas ĉiam la nekonscia ironiulo, kiu ne vidas pli malproksimen de sia nazo.

Esperanto, sinjoroj malamikoj, ne atentas vin!

Ĝi enhavas sanktan humanan idealon; kaj se vi ne estas kapablaj pensi, ĝi estas ankaŭ plena de praktika senco.

Dum mia longa esperanta vivo, kaj en bezono trakuri la mondon por gajni la ĉiutagan panon per la ŝvito el mia frunto, mi havis okazon konstati, ke nur internacia lingvo povas tute malaperigi la malfacilaĵojn por la homa interkompreniĝo.

Jen, mallonga, nur unu pruvo:

Mi estis dekses-jara kiam mi adiaŭis miajn gepatrojn por iri eksterlanden. Baldaŭ mi troviĝis en urbego, kie mi ne konis iun ajn, komprenante neniun en la plej grava afero... sen mono nek laboro.

Kiam mi studadis Esperanton, mi akiris la verdan stelon, kiun mi kunportis kaj ne forgesis surmeti en ĝia loko. Mirindaĵo ne prokrastis efektiviĝi. Du junaj studentoj proksimiĝis al mi kaj ĝoje demandis:

—Ĉu vi estas esperantisto?

—Jes, sinjoroj. Ĉu vi ankaŭ?

—Jes, ĉu ni povas ion fari por vi?

Kompreneble, mi nenion kaŝis el mia vera situacio, kun tiel bona sukceso, ke mi laboris je la venonta tago. Sed nova malfacilaĵo. Miaj kunlaborantoj ne komprenis min. Oni lokigis min, kiel helpanton de inĝeniero, tie mem. Eĉ mi ploris. Oni ŝarĝadis min kiel beston, kaj oni ordonis sammaniere ĝis mi forjetis la ŝarĝon, ellasante du vortaĉojn en Esperanto. Alia surprizo! La inĝeniero sin turnis, restis senmova dum minuto, kaj subite ĉirkaŭpremante min diris tre afable:

—Jen kie, ne sciante tion, mi havis frateton

De tiu tago mi jam ne plu suferis en tiu laborejo nek fizike nek spirite, ĉar mia granda frato lerte zorgis pri mi, samtempe mi profitis la okazon ellerni la tiean lingvon.

Mi sekvus rakontante aliajn okazojn tiel interesajn kiel tiu ĉi, sed nia Bulteno estas tro malgrandeta kaj restas multo por diri.

Se kelkaj amikoj kaj bonfarintoj rekonas min en tiu ĉi artikoleto, al ili mian plej koran manpremon.

Jes; sinjoroj mokemuloj; kiam vi estos havintaj, kiel mi, tiom da fratoj tra la mondo, tiam vi komprenos por kio taŭgas Esperanto kaj, kiel mi, vi dankos al ĝia kreinto, kun paroloj de Paco kaj Amo, per lingvo apartenanta al ĉiuj, ĉar ĉiuj estas liaj filoj.

J. VIGO MESTRES

NASKIĜO

Granda ĝojo regas en la hejmo de D-ro Rafael Herrero, bona amiko kaj ĉefa kunlaboranto de nia Bulteno, pro la feliĉa naskiĝo de bela filineto. Ni plene komprenas tiun ĝojon, ĉar la lerta cikonio, kiu portis la ĉarman etulinon, portis samtempe la efektivaĵon de sopirata revo. Ĉu necese diri, ke niaj gratuloj al la kontentaj gepatroj estas plej sinceraj kaj elkoraj?

Al nia kara amiko en Tabernes de Valldigna, Salvador Martínez Guillem, ankaŭ naskiĝis feliĉe tre ĉarma fileto.

La hundo kaj la krokodilo

(Fablo)

Trinkante, hundo en la Nilo
samtempe rapide kuris;
—Trinku kviete, al ĝi diris
ia ruza krokodilo.
—Trinki kaj kuri danĝeras,
diris la prudenta hundo,
sed, atendi de vi vundon
ĉu utilos al mi, vi kredas?
Ho! saĝa, maljuna hundo!
Mi admiras vian decidon,
tial ke, de malamiko
vi ne akceptis la konsilon.

Elhispanigis NAIVULO

INTER LA PROZO DE LA

En la vinberĝardenoj jam oni faris rikolton; krevas nun la grapoloj en la premilo, kaj ilia dolĉa suko fariĝas siropo antaŭ ol fariĝi vino. En la figarboj ankoraŭ restas plenmaturaj figoj, kiel ŝatata celitaĵo por la paseroj kaj ceteraj malgrandaj birdetoj. La abeloj ĉerpas kaj ĉerpas, ekster ĉiu alia zorgo, la nektaron el timiano kaj rosmareno. Tamen... ĉio en la naturo komencas oscedi, kvazaŭ laca, post la varma ebrio de l' somero. Eĉ la graciaj nimfoj miras, ke ne tiel diligente, kiel antaŭe, oni ilin persekutas, ĉar ankaŭ ja la satirusoj haltas kaj ripozas en densejo de la arbaro. Aŭtuno estas tre milda sezono, sed tro malbrila, tro malpreciza; vualo de melankolio envolvas la spiriton dum la nuboj, per la gazo de sia vaporo, filtras la lumon kaj grizigas la pejzaĝon. Gutoj el pluvo falas monotone; kaj dankinde estu, se fulmotondro ne furiozas elbordigante la pacajn riveretojn, kiuj, subite transformitaj en muĝantajn torentojn, inundas la valojn kun terura impeto de pereo kaj morto. Malĝoje mi statas sub ŝarĝo de intima doloro; tiu ĉi nebula medio, do, ankoraŭ pli malĝoje impresas en la animo. Ne ĉesas, ne ĉesas la pluvo; daŭre ĝi tamburas frapetante sur la tegmenton de mia fungodometo. Dum la ĉielo larmas, mi kaŭras antaŭ la papera tapiŝo de la malfermitaj paĝoj de ĉiuj gazetoj lastatempe ricevitaj; miaj okuloj ploris—ankaŭ la koboldetoj ploras!—sed la voko de mia esperantista devo karese admonas min forviŝi la larmojn kaj dejori en atenta legado por rakonti al vi iom el tio, kion diras nia gazetaro:

En plimulto de la gazetoj, ĉefa temo estas raportoj kaj informoj pri la Universala Kongreso. MONDA TRIBUNO prezentas kvar grandajn paĝojn kun belaj fotografaĵoj de ĉiuj niaj kongresoj en la nuna jaro. Tie oni povas vidi diversajn aspektojn kaj apartajn detalojn, kiuj grafike konvinkigos pli la eksteran publikon ol ĉiuj kutimaj vortoj. SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN, simile al la pasinta jaro, ankaŭ aperigis eksterordinaran numeron pri la grava solenaĵo. Mi prenas oficialan fragmenton, kiu, ĝenerale interesa, jene tekstas:

«*La 34-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Bournemouth de la 6-a ĝis la 13-a aŭgusto 1949, kun ĝojo konstatas, ke dum la lasta jaro en pluraj landoj gravaj sukcesoj estis atingitaj sur la kampo de enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj oficialigo de ĝia uzado en diversaj fakoj. La kongreso gratulas la landajn kaj fakajn asociojn, kiel ankaŭ la opajn esperantistojn, kiuj laboris tiucele. Same ĝi gratulas la aŭtoritatojn, kiuj montris ĝustan komprenon pri la praktikeco de Esperanto; malgraŭ la fakto, ke inter la esperantistoj ekzistas diversaj mondrigardoj*





Este es el Parlamento Universal del pueblo esperantista; el centro vital de un organis en su conjunto, el hecho magnífico que confirma todas nuestras palabras. El Esperan mundo que vive, piensa y siente; un pueblo que cada año manda sus representantes a se, para entenderse y comprenderse, empleando tan sólo un idioma—¡un idioma sólo: dos, y la unidad de una misma esperanza de am

ESPERANTISTA GAZETARO

kaj, konsekvence, pluraj individuaj konceptoj pri la rolo de Esperanto, la kongreso tamen opinias, ke ĉiu esperantisto estas vive interesata pri la progreso de la internacia lingvo, kaj tial la kongreso esprimas la varman deziron, ke sur la kampo de ĝia plua disvastiĝo la ekzistantaj esperantaj organizaĵoj kaj la tutmonda esperantistaro ĝenerale agu estonte kiom eble plej unuece.»

HEROLDO DE ESPERANTO aperigas kortuŝan bildon, kie troviĝas en densa grupo ĉiuj blinduloj, kiuj ĉeestis en Bournemouth. Ankaŭ ornamas la fruntan paĝon bela kliŝo, kie aperas en vigla kaj gaja sinteno ĉiuj geaktoroj de la Verda Stacio en Praha, pretaj por disaŭdigi ĉe mikrofono la ripeton de la fama opero «En la puto» kio tre sukcese okazis la unuan merkredon de kuranta Oktobro. FRANCA ESPERANTISMO kurioze informas pri la Kongreso per paralela teksto de du diversaj aŭtoroj; la redaktoro klarigas la aferon: «En la momento, kiam mi elŝiris miajn harojn—malrapide, ĉar malespero ne eklipsas prudenton en mia animo—tial, ke mi ne havis raporton pri la Kongreso, jen mi ricevis DU manuskriptojn!...». DANSK ESPERANTO-BLAD prezentas portreton kaj intervjuon kun la migranta muzikisto Henk Valckenier, tiu mem kiu verkis mallongan artikoleton por nia pasinta numero. En SVISA ESPERO, sub rubriko «Gazetlupeo», oni donas koncizajn informojn, en franca kaj germana lingvoj, pri la Esperanto-movado, por enpresigo en la nacia gazetaro. Kvankam la redaktoro plendas, ke nur 17 gazetoj ĝis hodiaŭ aperigas regule tiujn informetojn, mi konsideras tion preskaŭ kiel gravan sukceson. SENNACIULO amplekse raportas pri sia Kongreso en Parizo. Kvazaŭ speciala rubriko, aperas en ĝiaj paĝoj, de tempo al tempo, treege utila tabelo pri la vivnivelo en diversaj landoj, per kiu oni povas facile dedukti, kiel statas unu lando, en komparo kun alia. Ankaŭ estas interesa rezolucio de la SAT-Kongreso pri la pozicio de la nova Akademio: «La Kongreso plie konstatas malaprobe, ke plimulto el la nunaj akademianoj miope kontraŭas la eniron de kompetentuloj el la Laborista Esperanto-Movado en tiun organismon, kio nepre malutilos al la prestiĝo de la oficiala lingva instanco kaj endangerigos ĝian ĝeneralan kaj pure lingvan karakteron».

La krepuska malhelеco envolvas min per tuko el ombroj; se ne pro la takto de la pluvo, la silento estus absoluta. Nigraj siluetoj de la arboj, sur la fono de frua vespero, kongruas kun la medio. Mankas lumo; neeble jam plu legadi; sed la kvieteco kaj soleco estas oportuna kondiĉo por povi alten flugadi la pensoj kaj la sopiroj de

LA LEGEMA KOBOLDETO



o sano. Estos 1.530 delegados de 32 países, reunidos en Bournemouth (Inglaterra) son, no es una teoría, el Esperanto es una espléndida realidad, el Esperanto es... ésto: un na ciudad diferente, entre las diferentes naciones del mundo, para reunirse y fundir- . Esperanto!—sin más requisitos que la unidad de ese mismo idioma, común para to- entre los pueblos y paz entre las naciones.



REMEDIO INFALIBLE

En mi vida esperantista, uno de los más felices recuerdos, es el que guardo de mi primera visita a la simpática y laboriosa población de Cheste que, por florecer espléndidamente allí nuestro idioma internacional, era conocida entre los esperantistas valencianos por «La Meko de la esperantismo». Después de los actos oficiales (recepción en el Ayuntamiento, discurso del alcalde, etc., etc), nos reunimos en el Teatro, completamente lleno de público, donde se procuró distraer al auditorio con varias intervenciones oratorias.

Cuando me llegó el turno y me levanté para hablar, desde el escenario, «al la afablaj samideanoj kaj belaj samideaninoj», se me ocurrió que sería más oportuno si mis palabras fuesen dirigidas a los espectadores no esperantistas; sin más preámbulos, les conté este cuentecillo, leído hacía algún tiempo en la «Fundamenta Krestomatio»:

—«En cierta reunión, celebrada con motivo de no sé qué fiesta popular, se hablaba de las enfermedades contagiosas y de los nuevos remedios descubiertos para combatirlas. Entre los reunidos se encontraba un joven médico, simpático y de fácil palabra, y uno de esos llamados señoritos, cuyas únicas preocupaciones eran: comer bien, beber mejor, distraer con tonterías a las señoritas y... criticarlo todo, creyéndose ingenioso, siendo como era un perfecto botarate. Cuando el médico estaba hablando de los eficaces remedios actuales contra el cólera, le interrumpió el gracioso:

—Ustedes tienen remedio contra todas las enfermedades pero, con toda esa ciencia, ¿han encontrado también un remedio eficaz contra la nueva enfermedad que se extiende por el mundo, llamada la epidemia del esperantismo?

—¿Qué es esperantismo?—preguntaron.

—Esperantismo, contestó el niño bien con gesto de gran suficiencia, es aprender y propagar un idioma internacional que se llama Esperanto. dicha enfermedad consiste en que personas completamente normales, hasta ahora, se ven atacadas de locura y empiezan a aprender el nuevo idioma. Su fiebre alcanza temperaturas enormes y, en su delirio, hablan de paz y comprensión entre los pueblos y de que debemos amarnos los unos a los otros... Además, sienten la peligrosa pasión de contagiar a sus semejantes, siendo este el peligro mayor de tal epidemia. Se dice que la epidemia ha infectado ya a muchas ciudades. ¿Han inventado algún remedio contra dicha epidemia, señor doctor?

—Sí—contestó el médico (que precisamente era esperantista)—. Yo mismo me dediqué profundamente al estudio de esta epidemia y llegué a descubrir que, contra ella, sólo hay un remedio eficaz: Los bacilos de esa enfermedad se propagan por medio de los rayos del sol; en la obscuridad no pueden vivir, por eso el remedio más eficaz es vivir en lo profundo de un pozo donde todo sea tinieblas.

Hoy, como ayer existen personas todavía con la inteligencia encerrada en las profundas y obscuras cavernas de equivocados prejuicios, pero, aunque sea por descuido, en cuanto se asomen al mundo, por algún resquicio de su encierro espiritual, les alcanzará la acción bienhechora de los rayos solares y se verán contagiados de la noble manía de comunicarse y entenderse, por medio del idioma auxiliar internacional, con hombres de razas y tierras diferentes en mismo afán de buena voluntad y mutua confianza.

RAFAEL VIZCAINO

Nia samideano Vicente Palomares forlasis nin por eterne

Regas granda doloro en la koro de la esperantistoj de Tabernes de Valldigna (Valencio) pro la morto de nia samideano Vicente Palomares, kiu forpasis la 21-an de Septembro je 37-jara aĝo. Kvankam nuntempe li ne estis aktiva batalanto, pro privataj cirkonstancoj, estas juste kaj merite ke vi, ĉi tieaj malnovaj esperantistoj, rememoru lin kiel la unuan gvidanton de Esperanto en la gloraj tagoj de Tabernes de Valldigna. Lia simpatio, inteligenteco kaj bonhumora karaktero sukcesis en la varbado de novaj adeptoj, kiuj aliĝis en nia Esperanto—Grupo, unu el la plej grandaj de la Valencia provinco. Samideano Palomares estis plena, fervora esperantisto; senhezite kaj senlace li disvastigis nian lingvon inter la loka junularo; ĉiuj admiris kaj estimis lin pro lia afableco. Se Esperanto estas simbolo de amo, mi estas certa, ke li propagandis nian idealon per amo. Ni ĉiuj devas konservi, do, en niaj mensoj la agadon de tiu pioniro; kaj ni devas daŭrigi la marŝon per sama aktiveco kaj malavara donacado de horoj por efektiva agado, en rememoro al tiuj gloraj tagoj kiam la verda stelo pompis tra niaj propraj stratoj.

Estu al nia forpasinta amiko eterna la paco! Per gloraj sentoj, per amo al nia alta idealo, ni honoru digne la dignan fervorulon! Estu li por ni ekzemplo imitinda!

SALVADOR MARTINEZ GUILLEM
(*Tabernes de Valldigna*)

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● **Inglaterra.**—Durante el último Congreso Universal de Esperanto, celebrado en Bournemouth, la B. B. C. emitió por televisión un programa de televisión como propaganda del Esperanto. Igualmente, la B. B. C., en colaboración con la Radiodifusión Francesa, organizó una emisión especial, en la que intervinieron destacados elementos de los distintos grupos nacionales, y que fué altamente apreciada por los radioescuchas de Inglaterra y Francia.

● **Holanda.**—Durante el año en curso, el Esperanto ha sido enseñado oficialmente en 27 escuelas del país a un total de 600 alumnos que se encuentran en las edades de 10 a 20 años. Téngase en cuenta la importancia de esta enseñanza oficial.

● **Alemania.**—En el plan de estudios para las escuelas de Berlín, en los sectores occidentales, ha sido incluído el Esperanto como lección facultativa del actual curso.

● **Brasil.**—El Partido Republicano, una de las más fuertes organizaciones políticas del país, ha incluído entre los postulados de su programa de educación que la enseñanza del Esperanto sea obligatoria en todas las escuelas primarias. La importancia y el alcance de esta iniciativa es enorme, dada la calidad de los proponentes.

● **Japón.**—En números anteriores ya se ha dicho la difusión que alcanza la lengua internacional en los medios universitarios. Hoy podemos añadir algunos nuevos informes: Los estudiantes de Medicina de la Facultad de Tokío, así como los de la Escuela de Medicina de Jikei, estudian el Esperanto como introducción para el estudio del alemán, a fin de tener una mayor comprensión acerca de la estructura de los idiomas occidentales. Además de los centros universitarios en que el estudio de la lengua auxiliar es obligatorio, son muchas las instituciones donde dicha asignatura es voluntaria. La importante Revista de Física, en inglés, «Progress of Theoretical Plystchs», lleva ya publicados varios artículos completamente en Esperanto.

EL ESPERANTO Y LA CIENCIA

En Egipto, también se desarrolla rápidamente la adopción del Esperanto como medio de estudio. En el Instituto de Comercio del Cairo, más de 100 estudiantes lo aprenden; 40, en el YMCA, y 32, en la Universidad Americana.

En Nueva Zelanda, el Instituto de Educación de niños tullidos lo propugna para sus cursos por correspondencia.

En Holanda, la Real Academia de Ciencias emplea el Esperanto para resumir los artículos y comunicaciones de sus «Proceedings», entre ellos varios del Prof. J. M. Burgers, de Delft.

En Italia, se ha publicado un importante libro del Prof. Giorgio Canuto, sobre Medicina Legal, titulado «El cabello humano como elemento de identificación individual». Un extenso resumen en Esperanto figura al final del tratado.

En Finlandia, el Observatorio Astronómico de la Universidad de Turku usa el Esperanto en un reciente trabajo de índole matemática.

En Dinamarca, el laboratorio fitopatológico de J. E. Ohlsens Enkes ha publicado diversos trabajos sobre «Experimentos prácticos con Hexasect», con sumarios en la lengua auxiliar.

En Noruega, un estudio sobre «Biología marina», del Prof. Stop-Bowitz, ha aparecido, con un resumen en Esperanto, como otras publicaciones del mismo autor.

Estas son las últimas noticias sobre la progresiva marcha del Esperanto en el campo de la ciencia. Este creciente desarrollo de las actividades esperantistas en los medios científicos es una prueba evidente de que la lengua auxiliar internacional es necesaria no solo para el público en general de todo el mundo, sino que es el *único e imprescindible medio de difusión verdaderamente práctico para la ciencia.*

Dr. CIRANO

ĈU VI SCIAS, KE...

...la plej antikva enciklopedio estas la titolita NATURSCIENCO DE PLINIO, kiu, laŭ ĝia aŭtoro, enhavas 30.000 fakojn kolektitajn el 2.000 diversaj libroj.

Tiu ĉi verko ĝuis grandan aŭtoritaton en la mezepoko, kaj oni faris el ĝi 43 eldonojn, antaŭ la jaro 1536.

...dum pluva vetero estas neeble kapti abelon.

Tiuj ĉi, kiel la formikoj, la vespoj kaj araneoj, preparas siajn nestojn kaj kaŝiĝas en ili, kelkajn horojn antaŭ ol ventego eksplodos.

...la plej fortaj haroj estas tiuj el la vosto de la ĉevaloj.

...la blankaj katoj, ordinare, estas surdaj; kaj certe, se ili havas bluajn okulojn.

---

la homoj nur povas rezisti la mankon de aero dum kvin minutoj; la sendormecon dum dek tagoj; la mankon de akvo dum unu semajno kaj la mankon de manĝaĵoj dum periodoj je diversaj daŭroj, laŭ la cirkonstancoj.

Kiam ni dormas la unua senso, kiun ni perdas, estas tiu de la vido; poste, tiu de la gusto; sekve tiuj de la flaro kaj aŭdo; fine, tiu de la tuŝo. Tiu ĉi lasta estas, kiu plej facile vekiĝas; sekvas la aŭdo, kaj poste la vido. La gusto kaj la flaro vekiĝas lastatempe.

...la egiptoj atingis perfektecon en la arto distili parfumojn. Tio ĉi estas certigata per kelkaj alabastraj vazoj enhavintaj parfumon, kiuj estas konservataj en la muzeoj kaj kiuj, ankoraŭ nun, elspiras fortegan aromon, malgraŭ tio ili havas 2 aŭ 3 mil jarojn da ekzisto.

Esperantigis

R. VIZCAINO

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

DENTTEKNIKISTOJ!—S.° Ricardo de Luna, dez koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun eksterlandanoj. Paseo de Colón, 5, 1.°, 2.ª Barcelona (Hispanio).

ARMANDO CORTES (17-jara) Plaza M. de Estella, 8. WALTER MAÑEZ (25-jara) Plaza Iglesia, 3. ambaŭ en CHESTE (Valencia) Dez. koresp. kun junaj gesamideanoj el ĉiuj landoj.

RAFAEL VIZCAINO. C. Maluquer, 5, pral. 8.ª Valencia. Dez. interŝ, p. m. kun ĉiuj landoj. Serioza propono.

RAMON MARCO. Borrull, 14, 4.°. Valencia. Dez. koresp. kun juvelistoj kaj gravuristoj el ĉiuj landoj.

HEF-ANO: Helpu la eldonadon de nia Bulteno aĉetante kroman ekzempleron por via eksterlanda korespondanto. Unu ekzempiero du pesetojn.

AMIKO LEGANTO!—Memoru, ke ni bezonas vian opinion kaj viajn sugestojn. Mallongaj artikoletoj estas tre plezure akceptataj por oportuna publikigo.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12 ptas.	anuales
Socio abonado.. ...	25 »	»
Socio protector... ...	50 »	»

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín»